

NIA NASKIĜTAGO

Hieraŭ je la frua mateno Ludoviko kaj mi intertele-
iĝadis pro la okazo de nia naskiĝtago.

Jen do io holocene rava!

Post la kutimaj reciprokaj gratuloj Ludoviko diris:

"Mi sentas pliiĝantan silenton sub mia tombo kaj
mankas la papilioj inter la tomboj."

Mi respondis: "Jes, la insektoj pereadas. Pli ol
kvinent elcentoj definitive malaperis dum la lastaj
jaroj... Simile la lingvoj..."

Li spite al sia skeleteco diris: "Ho, mia kor'!
Nekredeble!"

Mi lin demandis: "Ĉu vi komprenas?"

Li diris: "Klare. Mi ja kelkfoje aŭskultadas
la vizitantojn de ĉi tombejo ĉe Okopowa Strato.

Ni devas progresi."

Mi demandis: "Kiel?"

Li diris: "Miatempe estis la homo, kiu gravis. Nun
estas la vivo, pli bone la viva..., ĉu?"

Mi respondis: "Jes, certe. La mortinta dubigas
la vivan. Onidire unue mortas la arboj kaj la abeloj
kaj poste la homoj..."

Li diris: "Jes. Ĝuste, tion ankaŭ mi konkludas el
la silento sube de mi kaj la komentoj el la verdo
de ĉi tombejo."

Ni poste multe parolis pri la nuntempa
epoko kaj ĉar estis nia naskiĝtago, mi decidis
donaci al li ion el la plej aktuala situacio
de lando, kiu tiam en lia epoko nur tre margene rolis.
Temis pri alia ekzemplo de surprize modernaj
praktikoj.

Estas ja pli da impresaj trafoj - jen en nia
afliktata mondo kaj ol oni povus diveni.

Aŭskultu: Tereza O'Povo (antaŭe Lola Montez II)
estis normala panjo el Irlando (Pura domo
estas grava signo de disispita vivo!), kiu
pasintjare perdis sian duan laborlokon. Kaj
post kelkaj ĉasoj por nova okupo ŝi komencis
labori rete. Ĝuste el la maldekstra angulo de
ŝia antaŭa loĝoĉambro. Ĉu ne estas iom
eksterordinare?! Kiam mi aŭdis pri tio mi
faligis mian globkrajonon...

Ludoviko fakte memoris pri Lola Montez - la unua,
kiu mortis en Novjorko kiam li estis ankoraŭ
tre juna. La dua Lola nun estis por li tre interesa
specimeno pri la aktuala epoko. Ni ĝis nun
ne finis la interparoladon pri la implikoj de
ĉi virino, malpli sportiva kaj malpli multlingva
kiel ŝia antaŭulino, sed iom pli serioze kultura kaj...
ankoraŭ vivanta...